



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 9 Septembro, 2014

*Kara Leganto, mi volas fari raporteton pri nia lasta kunsido. Finfine, post multaj jaroj, kunsidis estraro de la Esperanto-Societo de Ŝikago, preskaŭ ĉiuj membroj. Estis deciditaj kelkaj gravaj organizaj demandoj kaj ne nur. Al la E-societo revenis arkivo kun protokoloj de la unuaj kunsidoj: de la fonda (13an de Novembro 1953) ĝis la fino de 1959 (aloke, 100-a dateno de la Majstro kaj mia naskiĝjaro). Estis formita organiza komitato por festado de la Zamenhofa tago'2014, kaj nun mi povas informi vin ĉiujn, ke jam oficiale estis rezervita po festado la luksa salono sur la 24-a etaĝo de MDA City Apartments (63 E. Lake St.). Kiel pasintjare, oni bezonas RSVP-on (pli ĝusta informo aperos en la oktobra n-ro de "Saluton!").*

*La ĉeftemo de la kunsido estis someraj spertoj. Vi trovos interesan sperteton de nia Prezidanto L. Kordylewski, adiaŭan mesaĝon de MoJo, kiu revenis Koreion, anoj de E-klubo "Ora Pordego" el Ŝikaga ĝemelurbo Kijivo konkeris kun E-standardo Hoverlo-n – la plej altan monton de Ukrainio. Senlaca Gregoro Dolgin ĉi somere verkis tekston por la ankoraŭ unu konata melodio.*



*Pri malutilo de la rusa lingvo ĉe UNO informis retejo TRT TÜRK el Ankara (Turkio). Agrablan legadon! -La R.*

## Esperanto en Ŝikaga Pola Etero

Ĉi somere Pola Radio en Ŝikago invitis min paroli pri iuj polaj eventoj. Mi pensis ke mi jam forŝaltis mian poŝtelefonon. Sed mi eraris.

Subite la telefono eksonoris, do mi pardonpetis la redaktoron kaj respondis la telefonvokon. Evidentiĝis, ke neatendite telefonis nia Viktoro-la-redaktoro. Do, ni nature parolis en nia kara Esperanto. Mi rapide klarigis al Viktoro, ke mi ne povas longe paroli, ĉar la redaktoro ĉe mi jam atendas kun la mikrofono.

Post mi finis kun Viktoro, mi rimarkis ŝokitan vizaĝon de la redaktoro: "Kiu lingvo estas ĝi?" – demandis li scivoleme.

"Divenu" – mi respondis ŝerce.

"Certe ne hispana, nek latina, nek iu ajn konata, sed ĝi sonas tiel simile? Kiun, je diablo, vi parolas tiel flue?" – li insistis demandi.

Fine mi konfesis: "Mi plifaciligos vian taskon: ESPERANTO!"

"Esperanto..?" – ekmiris la redaktoro. "Mi pensis, ke ĝi jam formortis antaŭ longe. Vi estas la unusola parolanto de Esperanto, kiun mi renkontas".

"Ha, formortis?" – mi protestis. "Ja vi vidas, ke ĝi vivas eĉ en mia poŝtelefono.."

Post tiu neplanata interrompo ni daŭrigis rekordi la antaŭplanitan parolon. Tamen la redaktoro surprizigis min. Subite li enkondukis min al la aŭskultantaro kiel Esperantisto! Tuj la temo de la konversacio estis ŝanĝita: ni fine parolis nur pri Esperanto! –L. Kordylewski

## Miaj Tagoj en Ĉikago

Por mi, la lasta somero estis tiel okupita diri adiaŭ al Ĉikago. Mi ankaŭ devis foriri de ĉiutaga pejzaĝo inkluzive de Lago Miĉigano kaj Northwestern. Malgraŭ mia foriro, mi estis tre feliĉa renkonti la Usonajn Esperantistojn en la mezo de la anglalingva mondo. Ĉi tie en Seulo, mi skribas la kutiman impreson de miaj tagoj en Ĉikago.

En la universala torento de anglalingvo, la esperantistaro en Ĉikago ŝajnis, ke ili estis la malproksima insularo kiel Portugalaj Acoroj en Atlantiko. Tamen, ĉiu montspuro tie restos superbe sufiĉe lasi Esperanton travivi kiel grandioza Monto Pico. La Esperanta klubkunsidoj en Cobbler Square estis simbolo de espero por mi. La progresiva florado tie lastatempe ĝojigis min tre multe, ĉar la loko sen homoj facile dekadencos kiel Gary, Indianio. Kvankam la malfacila ondego estus altonda morgaŭ, tamen la estonteco estos entute la nia. La paca kaj neŭtrala lingvo en la mezo de malpaco estos pli signifoplena.

Ĉi tie, la sama florada sezono daŭros kaj cirkulos. La vivo iras plu. Sekve, ni renkontos denove *estontecon*. Aŭtuno iom post iom alproksimiĝas tie kaj ĉi tie. Tamen, la vera somero de Esperanto ne komenciĝis ankoraŭ. Mi rimarkis tion en Ĉikago, Usono.

Koran dankon al vi ĉiuj. Ĝis revido!!

–Mojo, Seulo, la 8an de Septembro, 2014

## E-standardo flirtas Super Hoverlo

La piedmarŝo "Milan Zvara" havas mallongan historion. Komence estis planata E-renkontiĝo en la ĉirkaŭaĵoj de la vilaĝo Dovhe, kie naskiĝis fama slovaka esperantisto Milan Zvara, organizanto de la E-renkontiĝoj en Karpatio en Slovakio kaj frue forpasinta. La unuan renkontiĝon en la jaro 2008 partoprenis tri esperantistoj: du slovakoj kaj ukrainoj. Tiam ni decidis okazigi piedmarŝon, ĉar en la vilaĝo ne estas multaj memorindaĵoj. Do, la sekvaj aranĝoj estis piedmarŝoj de la vilaĝo Dovhe al la plej alta monto de Ukrainio Hoverla. Verdire la piedmarŝoj same ne estis multenombraj, ĉar kompreneble por partopreni ilin bezonatas havi bonan fizikan staton. Tamen belaj de Karpatio allogas homojn kaj estas oftaj aliĝoj por kelktaga partopreno. En la jaro 2011 la piedmarŝon partoprenis 10 esperantistoj el 3 landoj. Ĉi-jare kvar esperantistoj el Kijivo (sur la foto: prez. de la kijiva E-klubo V. Hordijenko). En la venonta jaro "Milan Zvara" okazos inter la 6-a kaj la 16-a de aŭgusto. Bonvenon al ukrainiaj Karpatoj: [www.milanzvara.ukrainio.org.ua/](http://www.milanzvara.ukrainio.org.ua/)

–Volodimir Hordijenko, Prez.  
de la E-klubo "Ora Pordego"



## Ĉu Esperanto anstataŭ la Rusa?

The NY Times laŭ informo de la UN-a spertulo Jim Noland (Harvard Linguistics Research Group) skribas, ke la rusa lingvo, kiel unu el ses laboraj lingvoj de UNO, estis enkondukita sub la premo de Sovetio, sed ĝia rolo neniam estis digna. Se iam, en tiel nomata "Orienta Bloko", la rusa lingvo estis la nepre studobjekto, nun eĉ en tiuj tradicie pro-rusiaj landoj, kiel Serbio kaj Bulgario, oni forigis ĝin el lernejoj stud-programoj. Ankaŭ sur la eks-sovetia



teritorio la nombro de rus-lingvaj parolantoj malkreskas ĉiu jare. Pli kaj pli populara, speciale inter gejunuloj, fariĝas la uson-angla. Grave negative efikas popularecon de la rusa la milito en Ukrainio. Laŭ spertuloj, post kvin jaroj la rusa lingvo konservis sian vastuzadon nur en Rusio, Belorusio kaj Kazahio. Kaj pro tiu fakto Jim Noland rekomendas forigi la rusan el la listo de laborlingvoj de UNO. Li planas fari koncernajn ŝanĝojn al la Ĉarto de UNO. Lokon de la rusa povas okupi la portugala, la bengala aŭ eĉ Esperanto. – [www.trtturk.com](http://www.trtturk.com)

## La Unua Renkontiĝo (Historia de un amor)

Nova teksto de Gregory S. Dolgin laŭ muziko de Karlos Eleta Almaran (Panamo, 1955). La teksto estis verkita ĉi somere.

Renkontiĝis ni sub verda foliar',  
Kaŝis nin post urba bruo densa skvar'.

Ĝis-matene ni vagadis  
Kaj feliĉe paroladis,  
Akompane de l' gitar'.

Nin memoras ĉiu arb',  
Ĉiu branĉ' kaj floret'.  
Jen vidiĝas de l' arbust'  
Nia kun-siluet'.

De l' gitara akompano  
Same sonas por la kant'.  
Via man' en mia mano  
Ŝajnas kiel diamant'.

Renkontiĝis ni sub verda foliar',  
Kaŝis nin post urba bruo densa skvar'.

Ĝis matene ni vagadis  
Kaj feliĉe paroladis,  
Akompane de l' gitar'.

Dancas ni kun verda rond'  
Ĉirkaŭ font', freŝa font'  
Kaj ne dubas pri estont' –  
Nia sort' – tuta Mond'.

Jen gitara akompano  
Same sonas por la kant'.  
Via man' en mia mano  
Ŝajnas kiel diamant'.

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org](http://www.esperanto-chicago.org)

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Randy Ream  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Tina Seastrom  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses  
of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the  
Esperanto Society of Chicago,  
and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn  
828 S. Ada St.,  
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon  
de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**  
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**  
**Kunvenoj komenciĝas**  
**je 7 p.t. en la Suda**  
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Septembro – Temo estos anoncata  
[La Adreso: La Sulzer Biblioteko, Ŝikago](#)  
28an de Oktobro – Temo estos anoncata  
[La Adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago](#)